La Jarabono (kun aŭ sen membreco) estas libervola

# KRISTANA FRATARO

Oficiala Organo de la

INTERNACIA KRISTANA FRATARO

Redaktoro: LIVINGSTONE JENKINS

Help Redaktoro: J. A. JOHNSON, JULIO CSAPÓ M. PUTAALA, T. W. TEICH

Redaktejo: 21 MITCHELL ROAD, PALMERS GREEN, LONDON, N.13, ANGLUJO

TRIMONATA | OCTOBRO 1948 | N-RO 6

DEAR FRIENDS,

"Tell me the Old, Old Story of Jesus and His Love."

To Montagu Butler and a few others who seem to have difficulty in understanding the real purpose of the I.K.F., let me again state that the main object of our Frataro is to promote and encourage the growth of the real spirit of Brotherhood amongst those who claim to be Christians.

No matter how important it may seem to some to use the title of Catholic, Anglican, Quaker, etc., the fact remains, that unless we have the realization of the indwelling Spirit of Christ, we have little or nothing in common with the source of true brotherhood or love. God is Love, and to be like God, we must be Love-ly in its truest and deepest sense.

To those who carp or haggle over this or that doctrine, the I.K.F. has little to offer, but to those who love the Old, Old Story, and wish to spread the Good News of the Love of God, such will find with us a warm welcome and a fine field for useful work and co-operation.

Yours in His Service,

LIVINGSTONE JENKINS.

## I. KORINTANOJ, 3. 1-9

I. kaj mi, fratoj, ne povis paroli al vi kie lal spirituloj, sed kiel al karnuloj, kiel al infanetoj en Kristo. 2 Mi nutris vin per lakto, ne per manĝaĵoj; ĉar vi ankoraŭ tion ne kapablis; kaj eĉ nun vi ne kapablas; 3 ĉar vi estas ankoraŭ karnaj; ĉar dum ekzistas inter vi ĵaluzo kaj malpaco, ĉu vi ne estas karnaj kaj iradas laŭ la maniero de homoj? 4 Ĉar kiam unu diras: Mi estas de Paŭlo; kaj alia: Mi estas de Apolos; ĉu vi ne estas homoj? 5 Kio do estas Apolos? kaj kio estas Paŭlo? Servantoj, per kiuj vi ekkredis; kaj ĉiu, kiel la Sinjoro al li donis. 6 Mi plantis, Apolos akvumis; sed Dio kreskigis. 7 Tial nek la plantanto estas io, nek la akvumanto; sed Dio, la kreskiganto. 8 Sed la plantanto kaj la akvumanto estas unu; sed ĉiu ricevos sian propran rekompencon laŭ sia laboro. 9 Ĉar ni estas kunlaborantoj kun Dio: vi estas la kultivotaĵo de Dio, la konstruotaĵo de Dio.

*Tell me the old, old story.*
*"Evangel"* (*"Tell me"*): CEFGIS.
*"Gospel"*: GH. (Aŭ M 150, aŭ U 170).

1

Diru la historion
Pri Kristo nun al mi;
Rakontu plene ĉion
Pri lia am' por ni.
Kvazaŭ al juninfano
Rakontu simple ĝin—
Anima la malsano
Jam ellacigis min.
*Karan la historion*
*Rakontu nun al mi.*

2

Pri la Animsavinto
Solene diru vi;
Mi estas la pekinto,
Por kiu mortis li.
Ĉiam pri li parolu
Kun amo kaj fervor',
Kaj tiel min konsolu,
Se premas min dolor'.

3

Klare, per oftripeto,
Vi komprenigu min
Pri Dia elaĉeto
Por senpekigi nin,
Por ke la scio bena
Restadu en memor':
La roso frumatena
Tagmeze pasas for.

Diru la saman veron,
Se iam timos vi,
Ke vantan mondprosperon
Tro kare gajnis mi.
Kaj en la morta horo,
Ĉe mia vivofin',
Mi aŭdu el la gloro:
"Jesuo savas vin."

El la "Himnaro esperanta"
kompilita de s-ro M. C. Butler, L.R.A.M.
Havebla ĉe Brita Esperantista Asocio,
140 Holland Park Avenue, London, W.11

## PENSOLOGIO

PENSOLOGIO ne celas starigi novan sekton aŭ religion, sed HELPI homojn de ĈIU religia kredনuanco. Ĝi akcentas la internan Dian potencon en ĉiu homo, sed ne neas aliajn flankojn de la religio.

Senpagaj folioj: Dia Protektado, La Vivo Transformita, La Paco, Tagiĝas.

Serio de 12 broŝuroj: Klarigaj Vortoj pri la Pensologio. Pago laŭvola.

La Preĝo de Nia Sinjoro (Signifoklarigo): 2 int. resp. kuponoj.

Povo Sukcesi: 3 int. resp. kuponoj.

F. W. HIPSLEY,
17 Abbot's Road, King's Heath, Birmingham, 14

## DESIRAS KORESPONDADON

Hennry Becker, Neuwürschnitz i. Sa., Anton Güntherstr. 76n. Rusa Zono, kun junuloj per esp., angla, rusa aŭ latina lingvoj.

Vlastimil Antoŝ, Baŝty ĉ.4, Brno, Ĉeĥo-Slovakio, kun finnlandaj gefratoj.

Chang Ching-Chiu, P.O.Box 126, Kunming, Yunnan, Ĉinujo, deziras korespondi pri la intersanĝado de ĉinaj silkaĵoj kaj artaĵoj kontraŭ medikamentoj kaj lanŝtofoj.

Cor E. de Boer, Breestraat 33, Beverwijk, Holando, deziras sciigon pri la nuna adreso de Szemredi Francisko antaŭe de Timisoara, Rumanujo, kaj de Fritz Ducker, kiu loĝis unutempe en Köln, Germanujo.

## GAZETOJ K.T.P.

Heroldo de Esperanto (Teo Jung).
La Ponto (Dr. Siegfried Ziegler).
Revuo Orienta, Japanujo.
Austria Esp-Revuo.
Dia Regno (K.E.L.I.).
Kristana Gazeto (K.U.N.E.).
Novideilo, Brazilo.
Pograma Esperanto.
Eta Heroldeto (J. Eljot).
Heimin Simbun, Japanujo.
Japan Friends News.
Davidana 7-taga Adventisto.
Bellamy, Nederlando.
The Wayfarer (H. B. Pointing).
British Esperantist.

Mariendorfer Str. 34 a,
(1) Berlin-Steglitz, Germanio.

Al
la Redaktejo de Kristana Frataro,

Korajn dankojn pro la sendo de la Evangelio laŭ Sankta Johano kaj laŭ Sankta Marko kaj de la artefaritaj Biblio-Partoj. Mi sentis grandegan ĝojon pri tio.

Sed mi estas tutkore konfuzita kaj konsternita per la jenaj linioj, kiujn mi legis sur paĝo 4 de la Julio-numero 5:

> "Stanislaw Bogdanowicz (kaj multaj aliaj) . . . elpunktas, ke la nunaj ekonomiaj malfacilaĵoj en Germanujo estas nur la rezulto de la agado de la Germanoj mem."

Se politikistoj asertas tion pro iuj certaj celoj (politikistoj, kiuj unufoje kontraŭbatalas unu la alian ĝis preskaŭ tuta detruo kaj alian fojon kisas sin sur ambaŭ vangojn), tiam mi eble povas kompreni tion. Sed kiel estas ebla, ke "gefratoj" postparolaĉas tiun tute absurdan aserton? Tiu ĉi opinio do estas tute ne krista. Ne nur estas skribita: "Ne trompiĝu; Dio ne estas mokata", sed ankaŭ:

> "Dio estas la amo" aŭ
> "Dio amis la mondon (homaron) tiel, ke Li oferis Sian filon" aŭ
> "Ne kondamnu, por ke vi ne estu kondamnotaj" aŭ
> "Amu viajn malamikojn" aŭ
> "Se iu donas al vi baton sur la dekstran vangon, tiam ankaŭ prezentu al li la maldekstran" aŭ
> "Ĉu estas unu inter vi, kiu volas ĵeti la unuan ŝtonon?" aŭ
> "Ĉiu vidu unue la trabon en siaj propraj okuloj anstataŭ la lignereton en la okuloj de la aliaj" aŭ
> "Ciu balau antaŭ sia propra pordo" aŭ
> laŭ paĝo 14 "George Fox": "la disĉiploj de Kristo devas ne batali, sed devas ami ĉiun homon, eĉ malamikojn, kaj redoni bonon kontraŭ malbono."
> Kaj ankaŭ la alegorio de la perdita filo estus pripensata laŭ sama senco, kiel ankaŭ la vortoj de Kristo ĉe kruco al la krimulo, ke "li ankorau hodiaŭ estos kune kun Li en la paradizo".

Certe, tiuj ĉi kristaj agadoj estas malfacilaj. Sed Kristo ja ne diris: "Vivu amuzante vin!" sed li diris: "Prenu vian krucon sur vin kaj sekvu min!"

Cetere, mi povas certigi al la skribintoj, ke la amaso de la Germanoj tute ne sciis la teruregajn krimojn, kiuj malhonorigis nin en la tuta mondo, kaj nur sciiĝis ilin post la katastrofo per la publikigoj kaj procesoj de la okupantaj ŝtatoj.

Kun koraj salutoj, gefrate,

(F.INO) MARIE LAADE.

## DU FAMAJ KRISTO-BILDOJ EN AMERIKA GRANDMAGAZENO

Multaj ne scias, ke du belegaj komponaĵoj de la mondfama hungara pentroartisto Mihály Munkácsy, nome "Kristo antaŭ Pilato" kaj la "Golgoto" troviĝas en U.S.A., en Philadelphia, en la posedo de Mr. John Wanamaker. La bildoj en 1886 estis ekspozitaj en Ameriko kaj Mr. J. Wanamaker aĉetis la "Kristo antaŭ Pilato"—on en 1887, la alian en la jaro 1888. Kaj de tiam ĉiujare dum la paskaj festoj oni ilin ekspozas en la halo de grandmagazeno "Wanamaker". Alitempe la bildoj ne estas rigardeblaj, nek je speciala peto.

La grandmagazeno okupas dekunu etaĝojn kaj ĝi estas tiom gigantampleksa, ke por detala vizito ne sufiĉas unu tago. En la kolosa halo de la grandmagazeno pendas la bildoj sur la du kontraŭaj muroj; unu super la enirejo, la alia sub la granda orgeno. Ĉar ankaŭ orgenego troviĝas en la halo etaĝaltece lokita kaj ĉiumatene je malfermo oni povas ĝui belegan orgenludon kaj se oni fermas la okulojn, por ke ne ĝenu la brilo de la ekspozitaj varo-amasoj kaj la ĉiam kreskiĝanta trafiko, oni povas sin senti en preĝejo.

Antaŭ la bildoj staras la bronzbusto de Mihály Munkácsy kaj tie troviĝas la kataloga teksto pri la bildverkoj kaj la skribaĵo pri la biografio de la pentroartisto, bele interlokitaj inter verdaj vegetaĵoj. Ĉe la unua flanko de l' bildoj troviĝas du ŝtontabuloj kun la dekalogo kaj ĉe la alia flanko pendas la simbolo de la Nova Testamento, kiel du ŝildegoj, iluminitaj-viole. Ĝi estas bela kaj trafa kadro al la bildoj.

La naturgrandaj dimensioj de la figuroj kune kun la viglaj kaj belegaj tonoj onin katenas.

Ĉiutage miloj kaj miloj rigardas la bildojn kaj certe multaj venadas re- kaj refoje kaj tutcerte multaj kunportas kun si la blanke klaran, senpekan, majestan kaj dian figuron kaj mildan rigardon de l' Kristo, staranta en la fokuso de l' bildo.

Ankaŭ tiu-ĉi estas rimedo en la granda Ameriko, ke oni aldirektigu la atenton de miloj kaj miloj al la Savinto de l' mondo.

JULIO CSAPÓ, SATU-MARE,<br>Rumanio.

Rusa Zono, Germanujo.

TRE ESTIMATA SINJORO JENKINS!

Kun tre granda ĝojo mi ricevis vian leteron de la 14a de Majo, 1948, por ĝi mian koregan dankon. Precipe mi ĝojas, ke mi estis anigita kiel membro de la "Internacia Kristana Frataro". Al nia amiko kaj frato Helmut Müller mi transdonis la plej bonajn kaj koregajn salutojn. Nun mi volas plenumi vian deziron kaj tial doni al vi malgrandan artikolon pri la karbminekspluato en Saksujo.

La saksa ŝtonkarba minekspluato atingas trans la regionoj Oelsnitz (Erzg.)—Zwickau (Sachs.). La karbo ĉi-tie prezentas unuecan, kunependantan subteran spacon en ĉirkaŭa profundo de 600-800 metroj. Mi estas okupata en minejo en Oelsnitz kaj povas esti precipe fiera pro mia malfacila ministaprofesio, ĉar ĉi-tie estas la plej profunda ŝtonkarba minejo de Europo kun profundo de 1200 metroj. La cirkonstancoj en la minekspluato nuntempte estas malfaciligata pro la malmultaĵo de materialo kaj iloj, sed tamen en la Oelsnitza distrikto ĉiutage 8000 ministoj faras ilia malfacila laborado. La socialaj aranĝoj estas tre plibonigita per sufiĉa libertempo de 18 tagoj kaj per ekstra restado en sanighejmoj kaj sanigbanoj. La labortempo estas semajne 48 horoj, ni plej ofte je du dimanĉoj en la monato devas labori. Destinata "Devo", starigita de la okupatregistaro, ni nepre devas plenumigi. La nutraĵa situacio estas, kontraŭe al la aliaj profesioj, bona; kvankam kelkfoje la alliveraĵo de la nutraĵo por la dektagoj ceterlasas deziri (ĝi ne ĉiam estas ĝusttempa kaj perfekta).

Mi provis, kaj celas doni al vi per ĉi-tio raporto malgrandan envidon en la vivo de la ministo. Korege salutas vin en fidela ligeco via amiko kaj frato.

HEINZ STEMMLER! (Tradukis Helmut Müller)

## KRISTANISMO EN FINNLANDO

(Laŭ diversaj fontoj verkis H. Salokannel, Finnlando)

Finnlando ricevis sian romkatolikan religion je la jaro 1155, kiam sveda reĝo Erik la Sankta konkiris landon kaj postlasis ĉi-tie anglan episkopon Henrik, kiu baptis la unuajn finnojn kaj restis en la lando ĝis sia morto. Dum la katolika tempo en Finnlando troviĝis 6 monaĥejoj, el kiuj unu por virinoj. La plej malnovaj lignaj preĝejoj datiĝas de tiu tempo, sed dum la meza epoko ili estis konstruitaj ĉefe el ŝtono kaj ofte en formo de kruco. La protestanta kred-konfeso envenis Finnlandon dum la potenca sveda reĝo Gustaf Wasa, kiu regadis 1523 ĝis 1560. Dum lia tempo veturis al Germanujo finno Michael Agricola ricevante sian instruon de Martin Luther kaj Filip Melanchton. Li fariĝis esence la unua pure luterana episkopo kaj fondinto de finna literaturo. El lia plumo aperis unue la alfabeta libro, kredeble jam 1542, Preĝaro 1544, kaj la alfinnigita Nova Testamento 1548. Ĉi-jare ni do pasigos la 400-jaran feston de tiu ĉi libro. La eminenta traduko de tuta Biblio aperis 1642, pri kiu libro oni antaŭ kelkaj jaroj prenis faksimile-eldonon. Sian unuan universitaton Finnlando ricevis 1640.

Dum la sveda epoko Finnlando ricevis svedajn okcidentan kulturon, leĝojn, lernejojn, institutiojn ktp. Rekompence la lando helpis al sia metropolo per militistaro en sennombraj militoj. Tiu tempo daŭris de 1155 ĝis 1809, kiam Rusujo almilitis la landon. Nian aŭtonomion ni ricevis 1917. Pratempe la laboro de pastraro plenumis unuarangan taskon en popolklerigado, zorgado pri malriĉuloj, malsanuloj ktp. Ankoraŭ antaŭ ĉ. 300 jaroj la eklezioj prizorgis solaj pri tiuj taskoj en granda skalo. Nova komunumaleĝo 1865 liberigis la pastraron

el tiuj taskoj eksigante la eklezion de komunumo. Nur la inspektado de religi-instruado apartenas ankoraŭ al pastraro.

Finnlando havas ĉijare 593 ekleziojn, kaj ĉ. 96% el ties loĝantaro (4 milionoj) apartenas al la ŝtata eklezio. Plej grandan parton de alireligianoj formas la grek-katolikoj de orienta Finnlando kaj en urboj Helsinki, Turku ktp. Poste ni havas iom da libereklezianoj, metodistoj, baptistoj, adventistoj, turkoj, sav-armeanoj, pentekostanoj ktp. Multaj el tiuj etaj eklezioj aŭ direktoj apartenas tamen al la ŝtata eklezio. En la ŝtata eklezio mem estas rimarkeble diversaj luteranaj direktoj, kiel pietistoj, evangelianoj kaj (en la norda parto de Finnlando) la laestadianoj.

Dum la plej lastaj tempoj la religia vivo rimarkinde plivigliĝis en la lando, kiam oni instalis t.n. gejunulajn pastrojn, starigis Biblian kaj eklezian institutojn k.t.p. Manko de pastroj tamen malhelpas pli intensivan laboremon. Danujo, kiu havas egale grandan loĝantaron kiel Finnlando havas 600 pastrojn pli multe ol Finnlando.

Kiam antaŭ ĉ. 150 jaroj al eklezioj apartenis 1000 ĝis 2000 personoj, tiu nombro ekz. en la eparĥio de Tampere, nun superas meznombre 8000 personojn. Sur la kamparo ni povas renkonti luteranajn ekleziojn kun 1000-20,000 loĝantoj. Ĉiu eklezio, urbe aŭ kampare, posedas propran regadon kaj mastrumadon, al kiuj la kanonikaro, preĝeja aŭ eklezia registaro kaj la instrua ministrejo havas la vortrajton. De la amplekso de eklezio dependas ties riĉo au malriĉo. Antaŭ kelke da jaroj troviĝis ankoraŭ pli ol 100 eklezioj, kiuj bezonis subvencion el eklezia centra kaso. La paroĥestroj kutime ne ĉiam mem prilaboras sian kampon, sed luas tiun al aliuloj kaj estis en lasta tempo devigataj parte fordoni al kareloj ekleziajn kampojn kaj arbarojn. Kiel sciate, la kareloj estis devigataj forlasi sian provincon, Karelujon, en orienta Finnlando kaj transloĝiĝi (450,000) en alia parto de lando. Tio pro la lastaj militoj inter Finnlando kaj Rusujo.

Kiel menciite, ĉ. 96% el la loĝantaro de Finnlando apartenas al la luterana aŭ ŝtata eklezio tiel, ke oni insistas nian landon esti plej luterana lando en la mondo. Kiel poste funkcias la eklezioj? Eble la plej grandajn esperojn oni fiksas je la ĝustefondita gejunula pastraro, sed ĉiuj eklezioj ne ankoraŭ havas tian pastron. Poste al laboro inter la viroj kaj virinoj, studentoj, junularo ĝenerale, stratmisio, diakonia institucio, dimanĉaj lernejoj (230,000 lernejoj kaj 23,000 geinstruistoj), ktp. Radio donas en labortagoj ĉiumatene kaj ĉiun duan vesperon diserveton, kaj dimanĉe je la deka horo regule tutlandan diservon. Kiel eble tipan ekzemplon mi povas citi, ke en unu mezlanda eklezio ekzistas deko da Bibliaj rondoj, 30 kudrosocietoj kaj ĉ. 200 dimanĉaj geinstruantoj. Kompreneble ne ĉiuj eklezioj agadas tiel intensive. Sporade oni renkontas varman vekiĝon, kaj al tiu ni kun diligenta preĝado penadas.

Kiel ĝojigan fenomenon inter la diversaj kristanaj religiaj direktoj estas ankoraŭ menciinde la ekumena aŭ frata kunagado, kiu iam aranĝadas komunajn kunvenojn, interkonsiliĝojn kaj diservojn en frata spirito aspiranteal paco kaj interamo. Pentekoste 1948 oni fondis ankaŭ la landan sekcion de Internacia Kristana Frataro, al kiu tuj aliĝis eĉ kelkaj prepostoj. Kelkaj KELIanoj ankaŭ ekzistas.

En Finnlando troviĝas pr. 1000 preĝejoj kaj preĝdomoj. La unuaj katolikaj preĝejoj estis konstruitaj el ligno, sed en la meza epoko jam el ŝtono kaj briko. En Finnlando ekzistas ankoraŭ ĉ. 70 mezepokaj ŝtonaj kruc- aŭ bazilikaj preĝejoj, sed la novaj estas jam konstruataj nur el briko kaj havas la formon de baziliko. Dum la lastaj jardekoj multegaj preĝejo estis rekonstruitaj kaj bele ornamitaj. La unua preĝejo ekzistis en la proksimece de estinta ĉefurbo Turku, en paroĥo Nousiainen. La plej impona tamen estas nia nacia sanketjo, katedralo de Turku, kiu estis inaŭgurata jam 1290 kaj kun sia historia muzeo valore ornamita. En tiu urbo loĝas ankaŭ nia tutlanda arkiepiskopo Aleksi Lehtonen, vaste konata ankaŭ alilande. Kelkaj esperantistaj pastroj jam aranĝis diservojn. Finna kristana movado kaj literaturo estas riĉaj kaj multflankaj.

FINNLANDA SEKCIO (I.K.F.)

Koresponda Sekretario: Hugo Salokannel, Laihia (Vaasa), Finnlando.

## LA KRISTO SUPER LA LANDLIMOJ

Sur la montaro, kiu formas limon inter Argentino kaj Ĉilio en Sudameriko, staras dudekses futojn alta bronza statuo sur terglobo ankaŭ el bronza. Ĝi estas Jesuo Kristo, la Princo de la Paco, en unu mano la kruco, la alian li levas alten montrante al la Ĉielo.

La statuon oni starigis en 1904 el malnovaj kanonoj je memoro de la paciĝo de la du ŝtatoj, kiuj antaŭ nelonge staris sur la sojlo de milito. Jam oni pretigis armilojn, la milito ŝajnis neevitebla, kiam en ambaŭ landoj kelkaj homoj ekklopodisakcepti, kiel necesegon de la milito por aranĝi la disputojn. Ili kredis en la paco, ankaŭ ke paca sintenado povas solvi la diferencojn kaj ili laboris por la paco. Fine ili atingis, ke la registaroj de la du ŝtatoj submetis siajn disputojn al supera juĝistaro kaj oni aranĝis ĉion en spirito de amikeco en tia grado, ke la du ŝtatoj eĉ vendis siajn militŝipojn kaj reduktis sian militistaron.

La amikoj de la paco volis simboligi la pacon inter la landoj, super la landlimoj per starigo de la giganta monumento.

Hodiaŭ la mondo elpaŝis el unu milito kaj jam timigo de nova vibras en la animoj. Sed malmultaj homoj, kiuj kredas en la paco, kiuj laboras por la paco, kiuj povas konservi sian kvietecon kaj optimismon povas en tiaj tempoj influi la malĝustan direkton de la pensado de la tuta mondo.

Vi, kiu legas ĉi tiun gazeton, certe havas fidon en la boneco de Dio, vi estas pli granda forto en la mondo, ol vi mem konscias tion. Eble vi

pensas, ke via partopreno en la aferoj de la mondo ne estas grava, ĉar vi estas nur unu persono kaj via voĉo restas sen aŭskulto, viaj ideoj perdiĝas en la amaso de konfuzaj sciigoj, kiuj amasiĝas ĉiutage el ĉiuj partoj de la tero. Sed "malgranda fermento povas fermentigi la tutan farunaĵon".

Ni devas labori pli per ideoj, ol per eksteraj simboloj. Ni ne starigas statuon de Kristo, sed ni klopodas starigi en nia koro la ĉeeston de Kristo mem, "Jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi",—(Gal. 2.20.). Ni vidu la ĉeeston de Kristo stari fortege kaj pacplene en la koro kaj en la vivo de ĉiuj popoloj. Ni vidu ke la ĉeesto de Kristo transprenu la lokon de la limoj inter la landoj. Ni vidu, ke la ĉeesto de Kristo unuigu ĉiujn homojn per interkompreno. Ni vidu ne nur la fandiĝon de la militiloj, sed ankaŭ la "fandiĝon" de la kaŭzoj, kiuj pretigas tiajn militilojn; la malamo, la manko, la mizero, la avideco kaj la miskomprenado. Ni vidu ekstarigi novan figuron, la liberan homon de la mondo. Ni vidu Kriston ekleviĝi triumfante, starante eterne por la paco.

Ĉi tiujn pensojn mi prenis el kajero de Unity School of Christianity (Unuiĝa Lernejo de Kristanismo), Kansas City, Missouri, Usono, nomita "Daily Word" (Ĉiutaga Vorto), ekster-eklezia eldono. Mi sentis, ke tiuj ĉi pensoj sonas en unua vico al la esperantistoj, precipe al la kristanaj esperantistoj, kiuj konsciu pri sia forto per pensado, preĝado, influo kaj parolo fide lukti por la interkompreniĝo kaj paco de Jesuo Kristo.

P. BALKANYI, Budapest.

GRAVA: Mi petas, skribu multaj al adreso de "Unity", 917 Tracy, Kansas City 6, Mo., U.S.A., petante senpage anglan, germanan, hispanan, ktp. religiajn kajerojn. Ili sendas senpage. Sed ĉiuj nepre petu, ke estonte oni ankaŭ eldonu en Esperanto por disvastigo en ĉiuj landoj.

---

Ni kore dankas al la jenaj gefratoj kiuj sendis tre interesajn leterojn. . . . D-ro Kurt Bade, Frau Kathe Lampe, Cor E. de Boer, Hubert Slavik, John F. D. Thomas kaj Vlastimal Antos (pri Katolika Sekcio), Rudolf Adam, Josef Kunert, Olavi Peltonen, Martii Putaala, Kacumi Cumura kiu rekontaktis por ni nian malnovan Japanan Kunlaboranton Prof. M. Sadayasu, nuna adreso estas. . . . c/o Kyoto City Hall, Hawaramachi, Oike, Nakakyo-hu, Kyoto. Cesar Amaudruz, Gustav Kunzelmann kaj Heinrich Weber. Kelkaj sendis artikolojn por K. F. sed bedaŭrinde, nia presisto nur akceptas tiujn kiuj estas maŝinskribita kaj senerara. Samtempe la redaktoro tre valoras vian deziron helpi, kaj laŭ ebleco li elĉerpas kaj uzas viajn novaĵojn ktp en aliaj artikoloj. Dankon al ĉiuj kiuj skribas al ni. (L.J.).

PREĜU por Ursula van Well kaj Marta Blazgis kiuj estas en Hospitalo, kaj por Petro, la filo de Werner Wink, li saniĝas sed estas ankoraŭ tre malforta.

# INTERNACIA KRISTANA FRATARO

(An International Christian Brotherhood)

INTER-EKLEZIA . . . SEN-POLITIKA

Centra Oficejo: 21 Mitchell Road, Palmers Green, London, N.13, Anglujo.

(*Sek.* LIVINGSTONE JENKINS)

---

Japana Sekcio

K. CUMURA, HANAOKA, AKITA-KEN, JAPANUJO.

Ĉina Sekcio

CHANG CHING-CHIU, P.O. BOX 126, KUNMING, YUNNAN.

Finnlanda Sekcio

HUGO SALOKANNEL, LAIHIA (VAASA), FINNLANDO.

Aŭstria Sekcio

ALOIS HILKERSBERGER, LOTZWEG, 1, LANDECK, TIROL.

Germana Sekcio

T. W. TEICH, 22A, M.GLADBACH, REGENTENSTR. 40.

F. HELFERS, 17A, KARLSRUHE, BADEN, P.FACH 165.

Ĉeĥo-Slovakia Sekcio

H. SLAVIK, BRNO-NOVY LISKOVEC, KLUCHOVA č 23.

Hispana Sekcio

F. CURTO BASTE, MARTIN MOLINS 24, BARCELONA, 13.

Aŭstralia Sekcio

REG. BANHAM, 2, BANCHORY ST., ESSENDON, W.5, VICTORIA.

Hungaria Sekcio

P. BALKANYI, KREDITBANK, BUDAPEST 507.

Rumania Sekcio

JULIO CSAPÓ, STR. KINIZSI 70, SATU-MARE, TRANSKVANIO.

Brazila Sekcio

D. PEREIRA DE SOUZA, CAIXA POSTAL 3677, RIO DE JANEIRO.

Nederlanda Sekcio

COR. E. DE BOER, BREESTRAAT 33, BEVERWIJK.

Franca Sekcio

J. TUFFIER, 160 RUE DE PARIS, BOULOGNE-BILLANCOURT (SEINE).

---

PRINTED IN ENGLAND AT THE WESTMINSTER PRESS, LONDON, W.9